Moderna dezajno de flagoj

Enprofundiĝo de *"Bona flago, malbona flago: kiel desegni bonegan flagon"*

Martin Joubert
Konsultado de: Ted Kaye
Esperanta traduko: Cristina Bollini

ENKONDUKO 7

KIO ESTAS FLAGO? 8

LA 5 PRINCIPOJ DE FLAG-DESEGNADO

SIMPLECO 16

SIGNIFOPLENA SIMBOLISMO 26

BAZAJ KOLOROJ 36

NENIA SKRIBAĴO AŬ SIGELO 46

DISTINGEBLO AŬ SIMILECO 56

KAZESPLOROJ

BONA FLAGO: AMSTERDAM 68

MALBONA FLAGO: DETROIT 76

KONKLUDOJ 84

Enkonduko

Ĉi tiu libro ilustras kvin fundamentajn principojn por realigi bonan projektadon de flagojn, poste montras kelkajn flagojn, kiuj ilin sekvas, kaj aliajn, kiuj ilin ignoras.

Kia ajn estas via celo, vi povas uzi tiujn kvin bazajn principojn por krei esceptan flagon por via organizo, lernejo, urbo, firmao, familio, kvartalo aŭ eĉ por via lando!

La kreado de flago devas esti demokrata procedo.

Intereŝanĝu ideojn, kunpartigu viajn kreadojn kaj certiĝu ke la elektita dezajno taŭgas por tio, kion ĝi reprezentas, eĉ longtempe.

Ankaŭ estas interese kunpartigi la opiniojn de kiel eble plej multaj homoj el tiuj, kiuj estos kunigitaj sub la nova flago.

Bonan ŝancon dum via aventuro!

Kio estas flago?

Flago estu simpla, facile farebla, kaj taŭga por girlandoj aŭ festonoj; ĝi devus esti malsama ol la flago de iu alia lando, loko aŭ popolo; ĝi devus esti signifoplena; ĝi devus esti facile distingebla de malproksime; ĝiaj koloroj devus esti tre kontrastantaj kaj daŭraj; kaj fine, tio estas same grava, ĝi devus esti efika kaj estetike plaĉa.

— National Flag Committee of the Confederate. States of America, 1861

Kio estas flago?

Flago estas peco de stofo (ofte rektangula) kun desegno kaj distingaj koloroj.
Ĝi estas uzata kiel simbolo, kiel signalflago aŭ kiel dekoracio per ornama celo.
La vorto "flago" estas uzata ankaŭ rilate al la aplikata grafika dezajno; flagoj evoluis ankaŭ kiel signaliloj, precipe en medioj kie estas malfacile komuniki (en mara medio oni uzas semaforajn aŭ signalajn flagojn).
La studado de flagoj estas konata kiel "Veksilologio" el la latina vorto "Vexillum", kiu signifas flagon aŭ standardon.

Nacia flago reprezentas kaj simbolas landon.
Nacia flago aperas sur registaraj konstruaĵoj (urbodomoj, tribunaloj, ktp), sed ĝi povas esti uzata ankaŭ de la civitanoj.
La flago estas projektita kun specifaj signifoj atribuitaj al koloroj kaj simboloj.
La koloroj de la nacia flago povas esti portataj de la civitanoj por montri la apartenon al sia nacio, aŭ povas esti uzataj sur rilataj objektoj.

Nacia flago povas esti ŝanĝita post gravaj historiaj eventoj.
Bruligi aŭ detrui nacian flagon estas gesto, kiu akiras grandan simbolan valoron.

Flagoj estas patriotaj simboloj kun pluraj interpretoj, foje ankaŭ kun implicitaj militaj sencoj, pro sia deveno kaj uzado laŭlonge de la tempo.
Flagoj estas ofte uzataj por komuniki, reklami aŭ por ornama celo.

Uzado de flagoj ekster milita aŭ mara kunteksto komenciĝis je la fino de la XVIII-a jarcento; la unuaj naciaj flagoj reiras al tiu periodo kaj, dum la XIX-a jarcento, fariĝis komuna kutimo, por ĉiuj suverenaj ŝtatoj, adopti propran nacian flagon.



Moderna dezajno de flagoj.

Enprofundiĝo de: “bona flago, malbona flago: kiel desegni bonegan flagon“

Good Flag, Bad Flag: How to Design a Great Flag, (esperantigita "Bona flago, malgona flago") unue eldonita en la jaro 2001, ĝi listigis la kvin principojn por bona flagdesegnado, resumitajn de Ted Kaye kaj de la North American Vexillological Association – Flag-Ekspertoj de Usono kaj Kanado.
Rezulto de la kunlaboro de pli ol 20 veksilologistoj kaj veksilografistoj, ĝi fariĝis referenca teksto per tiuj, kiuj deziras provi koncepti kaj desegni novan flagon.

Multaj flagoj ŝanĝiĝis, post la eldono de tiu libro, kaj ankaŭ ĝia dezajno devis estis aktualigita.
Ĉi tiu versio, realigita kun la subteno de Ted Kaye kaj fidele Esperante tradukita, celas profundigi la kvin fundamentajn principojn por bona flagdesegnado.
Oni aldonas multajn ekzemplojn de dezajno (bonaj kaj malbonaj), kaj estas farita pli detala analizo de ĉiu ĉapitro.

La kvin bazaj principoj por flagdesegnado, kiuj konsistigas la strukturon de ĉi tiu libro estas:
- Simpleco
- Signifoplena simbolismo
- 2 aŭ 3 bazaj koloroj
- Nenia skribaĵo aŭ sigelo
- Distingeblo aŭ simileco

Por ĉiu principo vi trovos kvar ekzemplojn de bona flagdesegno (ĉiam sur maldesktra paĝo) kaj kvar de malbona flagdesegno (sur la dekstra paĝo), sekvatajn de pli profunda analizo de unu aŭ pluraj flagoj por resumi la ĉapitron.

Finfine vi trovos analizon de du flagoj (unu bona kaj la alia malbona) por praktike revizii ĉiujn regulojn.

Ni substrekas, ke tiuj ĉi estas nur simplaj gvidlinioj, kaj ke tiu libro tute ne volas esti nek devigo nek kritiko al la konsiderataj flagoj.

Tiu libro estas "open-source" (malfermonta) do vi povas riĉigi ĝin per aliaj ekzemploj kaj konsideroj, kaj ankaŭ traduki ĝin en via gepatra lingvo.

1
Simpleco

La flago devus esti tiel simpla, ke infano povus desegni ĝin parkere…

Flagoj forte flirtas sed ankaŭ dekoracias kaj drapiras. Flagoj devas esti videblaj de malproksime kaj de la mala flanko; pro tio nur simplaj desegnoj estas efikaj.

Krome, kompleksaj flagoj kostas pli por produktado; tio ofte limigas ilian uzon.
Plejparto de la "simplaj" desegnoj povas esti uzataj por krei bonegan flagon.
Simpligu desegnon, eble uzante nur unu simbolon, malmultajn kolorojn, grandajn formojn kaj nenian skribaĵon.

Ne entenu simbolon por ĉio. La desegno devus esti inversigebla aŭ almenaŭ rekonebla ambaŭflanke. Ne metu malsaman desegnon sur la dorsa flanko.

Alaska (Usono)

Steloj (kutima simbolo en Usono) ĉi tie estigas la konstelacion de la "Granda Ursino". La Polusa Stelo reprezentas la plej nordan ŝtaton de Usono. La minimumaj elementoj bone priskribas la ŝtaton.

Malio

Flago de Malio estas vertikala trikoloro kun egalaj bendoj. Verdo, flavo kaj ruĝo estas la tutafrikaj koloroj, kiuj bone priskribas la ligon inter la ŝtato mem kaj la apudaj landoj.



Saint-Pierre-and-Miquelon

Provante simboli la devenon de la plejparto de la loĝantoj de la insuloj, ĉi tiu flago, jam tre komplika, fariĝas nelegebla; ne metu flagon en alian flagon.

Nyandarua County, Kenjo

Centre de ĉi tiu flago, kies anguloj estas ornamitaj per kurbaj bluaj kaj blankaj strioj, estas blazono de la provinco, sur verda fono. Emblemoj kaj koloroj komplikigas la desegnon.



Palaŭo

Bluo, kiel en aliaj flagoj de pacifikaj insulaj landoj, simbolas Oceanon.
Cirklo simbolas la nacion mem.
Ne necesas multaj elementoj por krei unikan flagon!



Hong Kong

Desegno de flago estas riĉa je kulturaj, politikaj kaj regionaj signifoj.
Ruĝo estas ankaŭ "festa" koloro por la ĉina popolo.

Turkmenio

Tiu tre komplika tapiŝo enhavas 5 tradiciajn motivojn. Pli bone estu ne inkluzivi ilin kaj lasi nur lunon kaj stelojn centre de la flago.



Liège - Provinco, Belgio

Lieĝo (provinco de Belgio), uzas kiel flago reduktitan blazonon.
Ĉu vi kapablas rekoni kaj kompreni ĉiujn elementojn?

Serĉado de simpleco

La nuna hungara flago devenas de tiu de la movado por la nacia libereco, kiu kaŭzis la Revolucion en 1848. La flago inspiriĝas de la franca trikoloro kaj de la idealoj de la Franca Revolucio. La koloroj ruĝo, blanko kaj verdo devenas de la historia hungara blazono, kiu restis senŝanĝa ekde la mezo del la XV-a jarcento.

Dum la jarcentoj, la flago ofte ŝanĝiĝis. Dum la XX-a jarcento, eĉ 12 fojojn. Fine, je la 23-an de majo 1957 Hungario adoptis ĉi tiun trikoloron.

Ĝis la falo de la Habsburga Imperio en 1918, sur la flago videblas la ŝtata blazono subtenata de du ĉefanĝeloj. Poste okazis multaj etaj modifoj ĝis la kontraŭsovetiaj ribeloj de la 1956, kiam la oficistoj forigis blazonon el la flagoj, simple eltranĉante ĝin, kaj lasante truon en la centro. Poste, la registaro kreis novan blazonon, kiu tamen neniam estis oficiale adoptita, tiel lasante nur rugan-blankan-verdan trikoloron .

Kiel vi povas vidi, flagoj spegulas la politikan stabilecon (aŭ nestabilecon) de lando. Ofte ili akiras sian definitivan formon dum longaj pacaj periodoj, ĉar ĉiu politika regimo ofte tute renversas la antaŭan desegnon.



1896 - 1915

Simbolo de Hungara Revolucio de 1956

Nuna hungara flago

2

Uzu signifoplenajn simbolojn

Bildoj, koloroj aŭ simboloj devus esti rilataj al tio, kion li reprezentas

Simboleco povas troviĝi en la ĉefa grafika elemento, en la formo de la blazono, en la uzataj koloroj aŭ eĉ en la aranĝo de la flagopartoj aŭ en la formo de la flago mem.

Estas konsilinde uzi ununuran simbolon kaj eviti tiujn, kiujn povus havi plurajn interpretojn. Ankaŭ la koloroj havas proprajn signifojn; kutime ruĝo estas sango aŭ sinofero, blanko estas pureco kaj bluo estas akvo aŭ ĉielo.

La iamaj kolonioj ofte uzas diagonalajn liniojn, por diferenciĝis de la eŭropaj flagoj, kiuj havas horizontalajn aŭ vertikalajn striojn.

Groenlando

Blanka strio reprezentas glaĉerojn kaj la polusan kaloton, ruĝa strio simbolas oceanon; ruĝa duoncirklo estas fjordoj kaj tiu blanka simbolas glacimontojn.
Jen .... Groenlando!



Kenjo

Nigraj, ruĝaj kaj verdaj strioj dividitaj per tiuj blankaj, kun nigra kaj ruĝa masaŭa ŝildo kaj du krucigitaj lancoj: ĉio ĉi rememoras la kenjan popolon.



Cochabamba, Bolivio

La flago de la departemento de Cochabamba estas lazura. Unukolora flago estas tro simpla kaj perdas sian signifon kiam ĝi estas reprezentata en grizskalo.



Lagoa Formosa, Brazilo

Ci tiu flago tuj igas vin pensi pri Islando aŭ pri iu alia skandinava lando, pro la koloroj kaj la ĉeesto de la "Norda Kruco". Sed ... Lagoa Formosa estas brazila urbeto.

Urugvajo

La horizontalaj strioj (similaj al tiuj de la Usona flago) reprezentas la naŭ originajn departementojn de Urugvajo; "Sol de Mayo" ("Suno de Majo") simbolas la revolucion de majo 1810.

Nunavut, Kanado

Blua kaj flava koloroj reprezentas "riĉaĵojn de la tero, de la maro kaj de la ĉielo"; ruĝo simbolas Kanadon.

Centre, la "Inuksuk" estas tradicia ŝtona monumento.

Tenerife, Hispanio

Oni ne certas kial la flago de Tenerifo estas sama kiel tiu de Skotlando. Eble ĉar multaj riĉaj skotaj komerĉistoj loĝiĝis en Tenerifo....

Navaha Nacio, Usono

Pil ol 20 grafikaj elementoj kunfuzas la spektanton kaj neniu simbolo estas sufiĉe granda por esti facile videbla.

Ĉu vi sukcesas vidi la kvar montetojn?

Eŭropa Unio

Sur la blua ĉielo de la okcidenta mondo, steloj reprezentas la eŭropajn popolojn en rondo, simbolo de unueco. Ilia numero estas ĉiam dek du, simbolo de kompleteco kaj perfekteco.

— Eŭropa konsilio
Parizo, 7–9-an Decembro 1955

La potenco de simboloj

La Eŭropa Flago plenumas ĉiujn kondiĉiojn de ideala emblemo: ĝia simbolismo estas simpla, facile rekonebla kaj interpretebla; ĝi estas harmonia, originala kaj ankaŭ facile realigebla. Ĝi estas perfekta flago laŭ geometria, simbola, kaj politika vidpunktoj. Ĝi estas tre forta simbolo, al kiu la eŭropaj civitanoj estas tre ligitaj, kaj oni povas vidi ĝin montrata kune kun la flago de aliaj ŝtatoj sur publikaj kaj lernejaj konstruaĵoj.

La steloj estas ĉiam dek-du; nombro kiu reprezentas "perfektecon kaj plenecon" (en la origina franca teksto oni legas "symbole de la perfection et de la plénitude"). Ĝi ne estas ligita al la nombro de la membroŝtatoj (kvankam UE havas 12 membrojn kiam la traktato de Maastricht estis subskribita).

Surbaze de priskribo de la desegno fare de Paul M. Levy aliaj interpretoj estis proponitaj. La kvinpinta stelo estas uzata ankaŭ sur multaj nacaj flagoj kaj simbolas aspiron kaj kulturon. Ora (aŭ flava) koloro estas suno, simbolo de gloro kaj de lumo.

La ronda aranĝo reprezentas la Konstelacion de la Norda Krono, kaj povas estis vidata kiel krono kaj kiel simbolo de stabileco. La blua fono rememoras la ĉielon kaj simbolas veron kaj intelekton.

3

Uzu 2 aŭ 3 bazajn kolorojn

Limigu la nombron de koloroj sur flago al tri, bazaj kaj bone kontrastantaj

La bazaj koloroj de flago estas: ruĝa, blua, verda, nigra, flava kaj blanka, kiuj varias de helaj al malhelaj nuancoj. Foje oni uzas aliajn kolorojn, kiel violkolora, griza kaj oranĝkolora, sed malofte ili estas necesaj sur bone desegnita flago.

Dividu malhelajn kolorojn per hela koloro, kaj helajn per malhela: tiu kreas efikan kontraston. Bona flago devus esti bone reproduktebla en "griza-skalo" (nigraj kaj blankaj nuancoj).

Pli ol kvar koloroj estas malfacile distingeblaj kaj igas la flagon vane kompleksa kaj multekosta. Flagŝtofoj estas produktitaj nur en kelkaj koloroj; pro tio oni devus limigi la uzon al la bazaj koloroj.

Estonio

En la poezio de Martin Lipp titolita ”la Estona flago”, bluo simbolas lazuran kaj senliman ĉielon kiu elstaras super la naskiĝlandon, nigro reprezentas alligitecon al la tero, blanko simbolas purecon kaj laboron.

Tokyo, Japanio

Adoptita la 2-an Novembro 1943, flago de Tokyo estas unu el la malmultaj flagoj el violkoloro, antikva kaj tradicia koloro en Japanio. Ĉi tiu flago, sendube, havas modernan aspekton.

Coquimbo, Ĉilio

Ĉi tiu sufiĉe freŝdata flago prezentas maloftan trajton: kolornuancon neeblan brodi, kio limigas la produktadon ekskluzive al la presitaj flagoj.

Hela, Papuo-Nov-Gvineo

Kun entute 10 koloroj, flago de provinco de Hela (Papuo-Nov-Gvineo) estas unu el la plej komplikaj en la mondo.

Ĉu vi pensas, ke eble 10 koloroj estas tro multaj?

Corsica, Francio

Adoptita en la jaro 1755 fare de la generalo Pasquale Paoli la flago de Korsiko inspiriĝis de antaŭa tradicia flago. La foresto de koloroj igas ĝin vere unika!



Mararmea Japana flago

La "Flago de la Leviganta Suno", uzata de la feŭdalaj signoroj, estis adoptita kiel mara flago de la Imperia Mararmeo. La koloroj ruĝo kaj blanko kaj la suno tuj rememoras Japanion.

Tibeto

Konata ankaŭ kiel "flago de la neĝa leono"; la centra juvelo simbolas la veneradon de Tibeto al la "Tri Juveloj": Buddha, Dharma kaj Sangha. Tre bela flago, sed eble iom kunfuzita.

Brita Teritorio de la Hinda Oceano

Palmo kaj krono estas la simboloj de la Brita Teritorio de la Hinda Oceano. Sed, pro la malforta kontrasto kaj la ondecaj linioj (ondoj), ĉi tiu flago estas malfacile komprenebla.

Iuj reguloj estas faritaj por esti rompitaj

Kvankam kutime 2 aŭ 3 koloroj suficas, foje povas esti esceptoj. La tri flagoj, kiujn ni ĉi tie prezentas, estas inter la plej belaj en la mondo.

Tamen… non troigu.

Tro da koloroj igas la flagon pli malficile realigebla. Memoru disigi malhelajn kolorojn per hela kaj inverse.



Olimpikaj ludoj

Ĉi tiu desegno simbolas la kvin kontinentojn unuigitajn de la olimpika spirito, dum la ses koloroj estas tiuj, kiuj ĉeestis sur ĉiuj flagoj de la mondo, kiam ĉi tiu flago estis projektita.

—Pierre de Coubertin, 1931

Seychelles

La diagonalaj radioj simbolas novan kaj dinamikan landon, direktitan al la estonteco. La koloroj reprezentas: ĉielon, suno, decidon, justecon kaj naturon.

Sud-Afriko

En la momento de la adopto la flago de Sud-Afriko estis la sola kiu uzis ses kolorojn en la grafikaj elementoj (nun ankaŭ Sud-Sudano uzas 6 kolorojn), pro gravaj simbolaj kialoj.

A
B
C

4

Nenia skribaĵo aŭ sigelo

Neniam uzu literojn aŭ sigelon de iu ajn organizo

Vortoj ne plenumas celon; kial ne simple skribi "Japanio" sur flago? Flago estas grafika simbolo.
Estas preskaŭ neeble legi skribaĵojn de malproksime, kaj malfacile kudri aŭ redukti ilin al la grandeco de reverspinglo. Ne eblas legi renversitajn vortojn; tio devigas duopan aŭ triopan dikan ŝtofon.

Ne konfuzu flagon kun standardo portanta antaŭ marŝanta bando; tiu drapo kutine ne flirtas, estas videblaj nur de unu flanko, kaj de proksime.

Blazonoj estas desegnitaj por esti lokataj sur papero kaj vidataj de proksime. Malmultaj estas efikaj sur flagoj, ĉar ili havas tro da detaloj.
Estas pli bone uzi nur kelkajn elementojn.
Kelkaj logotipoj funkcias, aliaj ne.

Sankta Lucia

La trianguloj reprezentas Pitons, ĝemelajn vulkanajn konusojn, en la Suda Okcidenta parto de la insulo, nacia simbolo de Sankta Lucia.

Flago de Amazigh

Ĉiu koloro reprezentas aspekton de la teritorio loĝata de la popolo Amazigh de la Norda parto de Afriko (ankaŭ konataj kiel Berberoj). La simbolo "Yaz" simbolas "La Liberan Homon".

Wisconsin, Usono

En 1979 Wisconsin aldonis skribaĵon sur sia flago por distingi ĝin de la aliaj bluaj usonanaj flagoj. Anstataŭ valorigi simbolismon de la blazono, oni preferas klarigi ĝin. Ĉu eble eraro?

Centra Provinco, Sri Lanka

Sur la flago la sribaĵo "Centra Provinco" aperas tri fojojn: en la cejlona lingvo supre, kaj en la tamila kaj la angla lingvo en la suba parto. Tiel ke vi ĉiam ŝcias kie vi estas.



Vegana movado

La flago de la vegano movado sugestas la literon "V". Ĝi estas komponita de tri bluaj kaj verdaj trianguloj, kiuj formas la literon "V", inicialo de la vorto "Vegano".

Colorado, Usono

Alia ekzemplo de implicita letero estas la flago de Kolorado. Horizontala trikoloro blua-blanka-blua, kun, centre, litero "C" ruĝa, kiu ĉirkaŭas oran diskon.

ReNaMo, Mozambiko

La politika naciista movado ReNaMo de Mozambiko, en la pasinteco havis simplan flagon, sed decidis anstataŭigi ĝin per tiu komplika desegno.



Dominiko

La flago, adoptita en 1978, reprezenas la papagon Sisseru (endemia en Dominiko), kiu aperas ankaŭ sur la ŝtata blazono.
Ĉi estas bela, sed eble pli bone estus lasi ĝin en la arbaro.

Oni povas korekti erarojn!

Milwaukee: ĝia flago havas apartan historion. La nuna flago estas unu el la plej komplikaj en Usono. En 2015 la senprofita asocio Greater Together, kunlabore kun loka grafikisto, Steve Kodis, lanĉis konkurson, kiu kondukis al la kreado de la "Popola Flago de Milwaukee".
1006 poponoj estis prezentitaj, el kiu, nel 2016, estis elektitaj kvin finalistaj desegnoj. Reta enketo, al kiu partoprenis pil ol 6000 voĉdonantoj, elektis kiel gajninton la desegnon nomatan "Sunrise Over the Lake", kiu estas priskribata jene:

> *"La suno, leviĝanta super la lago Michigan, simbolas novan tagon. La lazuraj strioj reprezentas la tri riverojn de la urbo (...) kaj la tri fondintajn urbojn (...). Oro (flavo) reprezentas la bieran tradicion kaj blanko estas simbolo de paco".*

La organizantoj de konkurso disvastigis novan desegnon inter la loĝantaro, tiel ke la "popola flago" estas hodiaŭ uzata de multaj lokaj entreprenoj kaj aperas sur komerkaj produktaĵoj kiel marko aŭ etikedo.
Kvankam tiu flago obtenis grandan popolan sukceson, la urbaj aŭtoritatoj daŭre prokrastas la oficialan adoptadon de la desegno.

1927 - 1954

1954 -

Popola Flago de
Milwaukee de 2016

5

Estu distinktaj aŭ rilataj

Ne kopiu aliajn flagojn, sed uzu similecon por montri kunligojn

Tiu, eble, estas la plej malfacila principo, sed ĝi estas tre grava. Iafoje bonaj dezajnoj jam estas "prenitaj".
Tamen, simboloj, koloroj kaj formoj de flagoj povas memorigi aliajn flagojn - tipa maniero montri historion, solidarecon kaj kunrilaton kun aliaj landoj aŭ movadoj. Tio postulas bonan scion pri aliaj flagoj.

Ofte, la plej bona maniero komenci desegni novan flagon povas esti rigardi "radikojn" (eksistantajn ŝtatajn flagojn, tribajn aŭ religiajn simbolojn).

Uzu la disponeblajn rimedojn (interreton, bibliotekojn, ktp.) por identigi kaj studi la historion de tiuj flagoj.



Liberio

Fondita de la liberigitaj afrikaj sklavoj en Usono, Liberio reflektas tiun historian heredaĵon per simila, sed distinga, flago.

Etiopio

La etiopa flago inspirigis la tutafrikajn kolorojn (verda-flava-ruĝa), kiuj estas uzataj de multaj nacioj de la kontinento por simboli la fortajn ligojn inter ĉiuj afrikaj ŝtatoj. La centra flava stelo estas simbolo de Etiopio.

Indonezio

Krom la proporcioj, ĉi tiu flago estas precize kiel tiu de Monako, sed ne estas rilatoj inter la du landoj. Inversigante la kolorojn, oni obtenas flagon de Pollando.



New Hampshire, Usono

Tiu flago estas preskaŭ nedistingebla de tiu de 20 aliaj usonaj ŝtataj flagoj, ĉiuj kun blazono sur blua fono. Kiam estas malgranda, ĝi estas preskaŭ nelegebla.



Guernsey

La antaŭa flago de Guernsey estis tute egala al la flago de Britio. Ruĝa kruco sur blanka fono. Simpla aldono de flava kruco solvis la problemon.

Arubo

La flago havas strukturon similan al tiu de Curaçao (najbara insulo). Stelo reprezentas la kvar kardinalajn punktojn kaj simbolas la multajn devenlandojn de la loĝantoj de la insulo.



Sankta Heleno

La flago de Sankta Heleno similas al tiu de la plej multaj teritorioj de Commonwealth, krom la blazono, dekstre metita.



Malsupra Normandio, Francio

Tiu flago baziĝas sur la blazono de Vilhelmo la Konkerinto. Sed ĝi estas uzata tra la tuta Normandio, ne nur en la regiono de Malsupra Normandio.

Ordinara geedziĝo

Kunpartigita kaj universale konata estas la norda kruco.

Originante el Danio, oni pensas ke ĝi reprezentas kristanismon.

Ĝia ĉefa trajto estas la malcentra pozicio de la vertikala linio de la kruco, iomete delokita direkte al la flagostango.



Danio



Norvegio



Svedio

Finlando



Islando

Kaz-eksploroj

Nenio estas pli bona ol ekzemplo por resumi

Kiel desegni bonan flagon



Amsterdam, Nederlando

Simpleco

Flago de Amsterdamo, Nederlando, estas bonega ekzemplo de la unua regulo: flago devus esti tiel simpla, ke infano povus desegni ĝin parkere.

En 2015, dum la radia elsendo "*kial urbaj flagoj eble estas la plej malbone desegnitajn aĵoj, kiun vi iam vidis*", Roman Mars diris:

"*Se vi volas desegni mirandan flagon, eĉ belegan.... komencu per simpla 2,5 x 3,8 cm rektangulo sur paperfolio.*
Via desegno devas esti entenata ene de tiu rektanguolo. La kialo?
Flago kun dimensioj de 90 x 150 cm, pendanta de stango ĉirkaŭ 15 metrojn for, ŝajnas havi proksimume la grandecon de la rektangulo, kiun vi desegnis kaj kiun vi vidas nun cirkaŭ 30 cm for de via vizaĝo.
Vi surpriziĝos, kiom simpla kaj alloga la desegno povas esti, se vi respektos tiun limon".

Flago de Amsterdamo konsistas el tri orizontalaj strioj (ruĝa-nigra-ruĝa) kun tri blankaj Sankta Andrea krucoj, lokataj ene de la nigra strio.

Ĉi ne povus esti pli simpla!

Signifoplenaj simboloj

Uzante la sama modelo (trikoloro) de la flago de Nederlando, la amsterdama flago tuj kreas kunigon inter la du. Sed la ĉefa elemento de ĉi tiu flago estas la tri krucoj de Sankta Andreo (vaste uzata simbolo en veksilologio), lokataj sur la centra strio.

Oni diras ke la tri krucoj reprezentas la tri katastrofojn, kiujn la loĝantoj de Amsterdamo ofte devis alfronti: fajron, inundon kaj nigran peston. Tamen, la vera signifo eble originas de la blazono de la familio Persijn, kiu posedis vastajn teritoriojn en la ĉefurbo.

En la jaro 1820 Kavaliro Jan Persijn iĝis Sinjoro de Amstelledamme, hodiaŭ Amsterdamo.

Ekde tiam la tri krucoj de Sankta Andreo iĝis unu el la plej famaj simboloj de la urbo. Ili troveblas sur la brikoj de konstruaĵoj, gravuritaj sur la randoj de la stratoj, ĉe bushaltejoj, sur la indikiloj de muzeoj kaj sur la logotipoj de publikaj institucioj kaj sur la titolita papero en la oficiala korespondado.

Malmultaj bazaj koloroj

Flago de Amsterdamo uzas nur tri kolorojn, do respektas tiun fundamentan regulon. La koloroj devenas de la ŝildo de la urba blazono mem, kiu originas de la koloroj de la familio Persjin.

Ĉi tiuj koloroj, same kiel la krucoj, aperas sur flagoj de du najbaraj urboj: Ouder-Amstel kaj Amstelveen.

Ĉiu koloro havas signifon. Komence, ruĝo devus esti oranĝkolora, simbolo de la reĝa familio. Sed la tiama oranĝkolora farbo, post eksponiĝo al la suno, iomete ruĝiĝis, sanĝiĝante tiom molte, ke finfine, oni decidis uzi rekte ruĝon.

Sur la blazonoj de aliaj du nederlandaj uboj, Dordrecht kaj Delft, la centra strio simbolas akvon. Sur la flago de Amsterdamo, la nigra strio simbolas la riveron Amstel.

Nenia skribaĵo aŭ sigelo

La blazono de Amsterdamo estas ruĝa sildo kun nigra bendo kaj tri arĝentaj krucoj de Sankta Andreo, kun imperia Aŭstra krono, du leonoj kaj la devizo de la urbo. Ĉiuj elementoj originas de la historio de la urbo. La krono, same kiel la krucoj, ankoraŭ ĉeestas, kiel ornama elemento, en multaj simbolaj lokoj de la urbo mem.

Sub la ŝildo, blanka rubando entenas la devizon “Heldhaftig, Vastberaden, Barmhartig” ("Heroa, Rezoluta, Kompatema").

Tiun ĉi elementon aldonis Reĝino Wilhelmina en 1947 por memorfesti rolon de civitanoj de Amsterdamo dum la Dua Mondmilito.

Blazono de Amsterdam

17-a jarcento - 1975



Varianto uzita en 17-a jarcento

Same kiel la hungara flago, la flago de Amsterdamo spertis plurajn ŝanĝojn dum la jarcentoj, ĝis kiam ĝi akiris sian nunan aspekton. Denove ni citas Roman Mars en lia TED-prelego:

"Jen la blazono de la urbo Amsterdamo. Nu, se ĝi estus urbo en Usono, verŝajne la flago aspektus tiel (....) Sed la flago de Amsterdamo estas tiel (...) Anstataŭ ol alglui la tutan blazonon sur unukolora fono kaj simple skribi sube "Amsterdamo", oni prenas la ĉefajn elementojn de la blazono kaj transformis ilin en unu el la plej belaj urbaj flagoj de la mondo".

Distengeblo

Ĉi tiu estas ligita kaj al sia propra lando, kaj al najbaraj urboj, sed ĝi elstaras pro sia unika kaj aŭdaca dezajno.

Ekde tiam ĝi fariĝis fonto de fiereco por la loĝantoj de la "Norda Venecio" kaj altvalora memoraĵo por multaj turistoj.

Kiel dezegni malbona flago



Detroit, Michigan, Usono

Simpleco

"Kiam li desegnis ĝin, li decidis enteni la tutan historion de sia urbo". *Jen kion skribis Joel Stone, kuratoro de la Historia Muzeo de Detroit, parolante pri David Heineman, kreinto de la flago de Detroit.*

Ĉi estas mirinda resumo de tio, kion vi havas antaŭ vi. Flago estas certe rimedo por rakonti historion, se ĝi ne devus rakonti la tutan historion.

"Estante profunde engaĝita en la urbo, Heineman komprenis, ke la urbo bezonis propran flagon, kaj ke ĝi devus esti reprezenta. Ĉi devis reprezenti la urbon per la jam bone establita blazono (...) Sed ĝi devis esti ankaŭ bunta, kaj inspiriĝi de la historio de la urbo" (denove citante Sone). Heineman certe havis bonajn intencojn, sed li ne havis ĉi tiun manlibron je sia dispono....

Signifoplenaj simboloj

Ĉi tiu flago entenas amason da signifoplenaj simboloj, sed ĝuste tio estas la problemo: estas tro multaj. Estas malfacile kompreni ĝin de proksime, des malpli kiam oni vidas ĝin sur alta flagmasto.

Ĉi havas kvarpartitan fonon. Ĉiu parto reprezentas urbon, kiu iam kontrolis Detrojton.

La malsupra maldekstra kvarono reprezentas Francion, kiu fondis la urbon kaj la establiĝon en 1701: ĝi konsistas el kvin oraj lilioj sur blanka fono, imitante la reĝan standardon de Francio.
La supra dekstra kvarono reprezentas Britio, kiu kontrolis la urbon de 1760 ĝis 1796 kaj prezentas la tri orajn leonojn sur ruĝa fono, kiel la reĝa blazono de Anglio.
La malsupra destra kvarono havas 13 ruĝajn striojn sur blanka fono, kaj la supra maldekstra kvarono 13 blankajn stelojn sur blua fono, kiuj rememoras la 13 originajn koloniojn de Usono.

La du latinaj devizoj estas "*Speramus Meliora"* kaj "*Resurget Cineribus"*, ("Ni esperu je pli bonaj aferoj" kaj "Ĉi reveliĝos el la cindro"), vortoj de la katolika pastro Gabriel Richard, skribitaj post la granda brulo de 1805.

Malmultaj bazaj koloroj

Se la flago konsistus nur en la fono dividita en kvar partojn (vidu sube dekstre) kun la simboloj de la tri urboj, ĝi estus iom tro bunta, se ne sufiĉe por esti "malbela".

Bedaŭrinde, adono de blazono enkondukas pli ol ses kolorojn, kiuj vide pezigas la flagon.

Heineman, por reprezenti la tutan historin de la urbo, enigis superfluajn elementojn kiel la granda brulo kaj la rekonstruo de Detroit.



1948 - 1972



Sen blazono



Simpla versio (nekonata aŭtoro)

La simpligita versio de la flago respektas la originalon, retenante ĝian esencan signifon kaj limigante ĝin al tri koloroj.

Nenia skribaĵo aŭ sigelo

Ĉu vi konas la signifon de blazono? Eble ne.

La blazono simbolas la detruigan brulon de Detroit (11-a de Junio 1805). Nur unu konstruaĵo restis staranta. La maldekstra figuro funebras la detruon, dum tiu dekstra indikas la novan urbon, kiu poste leviĝos. La simboleco de la blazono estas vere plenumita.

Tamen, denove, kompleta blazono neniam devus esti enmetita sur flago. Precipe se ĝi enhavas kvar skribaĵojn. Fakte, la blazono ankaŭ entenas la vortojn "The City of Detroit" kaj “Michigan”, kiel ĉe multaj blazonoj de usonaj urboj kaj ŝtatoj.

Distengeblo

Male al la flago de Amsterdamo (supre vidata) kiu fariĝis fonto de fiero por siaj loĝantoj, tiu de Detroit ne honoras ĝian urbon. Tro kompleksa por esti aprezata de loĝantoj, ĝi nun estas plejparte konata nur de lokaj historiistoj.

Oni esperas, ke la flago de Detroit sekvos ekzemplon de tiu de Milwaukee, kiu estis redesegnita kaj bonvenigita de la loka loĝantaro.
Deon Mixon, studento pri grafika dezajno ĉe Western Michigan University, en 2017 proponis novan flagon.



Flago de Deon Mixon

Jen kiel Mixon priskribas la historian periodon:
Detroit spertas renovigon kaj, por honori la grandajn klopodojn faritajn en la pasinteco kaj tiutempe, por reviviĝi en la cindrojn, ĝi meritas novan simbolon de renaskiĝo.
Detroit bezonas novan flagon.
La nuna ne respekstas la fundamentajn principojn de bona dezajno.
La desegno estas tro kompleksa, uzas multajn kolorojn kaj la urba blazono ne devus esti enmetita sur la flago mem.
Ĉi tiu restrukturado estas respondo al ĉi tiuj problemoj kaj ankaŭ al la civitanoj, kiuj eĉ ne scias, ke ilia urbo havas flagon.

Ĉi tiu projekto celas instigi la loĝantoj de Detroit adopti, montri kaj ami la novan flagon, kaj precipe revivigi la bildon de la urbo.

Tien li priskribas la simbolas signifon de lia projekto:
La koloroj nigra, blanka kaj blua reprezentas rezistemon, heroecon kaj progreson.
La radioj de la stelo reprezentas la plej sukcesajn sektorojn de Detroit: aŭtomobilan industrion, muzikon, arton kaj dezajnon, vivsciencojn kaj altteknologion..
La blanka formo simbolas la riveron Detroit kaj la devizo de la urbo.
Kune ĝi reprezentas la renaskiĝon el la malfacilaĵoj, kiujn la urbo alfrontas, kaj la vojon al pli bona estonteco, kiun la urbo esperas atingi kaj certe atingos.

Konkludoj

Gratulojn... nun vi scias ĉion (aŭ preskaŭ ĉion) kion oni devas scii pri la desegnado de flagoj kaj pri la evitandaj kaptiloj, kiom oni kreas novan flagon.

Ofte la plej bona maniero komenci la desegn-procezon estas bone studi la historion de tio, kion vi volas reprezenti.

Profitu la multajn disponeblajn fontojn por helpi vin identigi flagojn kaj ekkoni ilian historion....

Faru tion kun amikoj kaj familianoj.

Vi povas interesiĝi pri la flago de via urbo (eble vi ne scias ke ĝi havas flabon) kaj provi redesegni ĝin per la scioj, kiujn ĉi tiun broŝureto provizis al vi. Se vi estus sufice persistema (kaj ankaŭ bonŝanca) vi povus helpi ŝanĝi la historion de la loko, kie vi vivas.

Kaj memoru.... ĉiam estu kurioza, kiam vi vidas flagon!

KREITA: Ted Kaye, Martin Joubert kaj "North American Vexillological Association" (la spertuloj pri flagoj de Usono kaj Kanado)

ANGLAJ REDAKTISTOJ

Martin Joubert

Mégane Berthoux

GRAFIKA

Martin Joubert - marth.fr

ESPERANTA VERSIO

Cristina Bollini
cristina.bollini@feniks.it

DANKON: Ted Kaye, North American Vexillological Association, Mégane Berthoux, Sophie Lando Rentien, Hugo Lecrux, Raphaël John Danglot, Sandrine Nugue, Le Centre National des Arts Plastiques, Marie & JLJ.